# «Le Groupe Esperanto du Maine» salutas vin!

*Bonvenigaj vortoj*

*«Mi ploris ĉar mi ne posedis ŝuojn kaj mi vidis homon kiu ne havis piedojn... »*

**Persa proverbo**

*Enhavo*


| | |
|---|---|
| Zamenhofa Tago 2024 | p.1 |
| Nobel premio pri paco | pp.2-3 |
| Homaj Rajtoj | p.4 |


# ZAMENHOFA TAGO okazis en Le Mans la 8-an de decembro 2024



Okaze de nia Zamenhofa Tago, Armel Amiot prezentis sian spektaklon « Esperemo » kaj kelkajn kantojn de Graeme Allwright, kantigante kaj dancigante nin en agrabla etoso.

*Legu pli p.1*

## GRAEME ALLWRIGHT
**7-11-1926 16-02-20020**

Sydney Graeme Allwright naskiĝis la 7-an de novembro 1926 en Nov-Zelando kie li pasigis sian tutan infanaĝon. Kiel adoleskanto, li pasiis pri teatro. Li iris al Londono por studi teatron kaj poste ekloĝis en Parizo kun sia edzino.

Post kiam li laboris en diversaj profesioj, li iĝis aŭtoro, kantisto kaj komponisto.


Liaj plej konataj kantoj mesaĝis neperfortan societon kaj klopodis por pli humana, pli justa socio. Li ankaŭ estis engaĝita kontraŭ nuklea energio kaj iradis al la Larzac-altebenaĵo, inter 1971 kaj 1981.

En 2005 li kampanjis por ŝanĝi la tekston de la nacia himno "La Marseillaise" kiun li trovis tro perforta.

Li adaptis kaj konigis en la franclingva mondo multajn kantojn de Leonard Cohen, Bob Dylan, Woody Guthrie, Pete Seeger, aŭ Tom Paxton kaj kantojn el la usona repertuaro.

Post lia rapida sukceso kaj pro timo esti tro ekspozata en la amaskomunikilaro kaj psikologie malfortiĝi, li decidis resti marĝene kaj ofte vojaĝis eksterlanden. Por siaj spektakloj li ĉiam preferis malgrandajn scenejojn en "urbetoj" proponante varmajn koncertojn, kie tutsimplece kaj per intensa empatio, li komunikas kun sia publiko.

Graeme Allwright forpasis kiam li estis 93 jaraĝa, la 16-an de februaro 2020, en la departemento Seine et Marne.




Fonto: Wikipédia


# Zamenhofa Tago 2024 en Le Mans (72)

Dimanĉo la 8-an de Decembro 2024 la esperanta grupo de Le Mans (GEM) plezure organizis la regionan "Zamenhofan tagon 2024". Por ĉiuj esperantistoj ĝi estas memorinda tago pri naskiĝo de Ludoviko Zamenhof, inicianto de la lingvo esperanto, la 15-an de Decembro 1859.

Je la naŭa kaj tridek minutoj okazis amika akcepto kaj bonvenigo en la domo de la kvartalo "Le Pré". Tridek sep esperantistoj el diversaj grupoj kunestis okaze de tiu tago: Le Mans, Angers, Tours, Caen-Hérouville.

Jen la proponita programo
- ĉiuj grupoj prezentis sian agadon kaj projektojn
- ni kune ludis por traduki tipajn francajn esprimojn kaj trovi la plej taŭgajn vortojn
- Frank el Le Mans prezentis etan prelegon pri "kelkaj aspektoj de lingva evoluo "

En la salono ni ankaŭ proponis libro-servon kaj ekspozicion pri la vivo de "Gaston Waringhien", famkonata esperantisto kiu estas entombigita apud nia urbo le Mans. La grupo de Caen kunportis plurajn librojn de sia biblioteko.


Vie de Gaston WARINGHIEN en quelques dates

29 juillet 1901 : Naissance à LILLE (d'un père instituteur et d'une mère sans profession)

20 décembre 1991 : Mort à Paris (Inhumation à AIGNÉ le 24 décembre 1991)

Études
1920 (à l'âge de 19 ans) : Obtention d'une licence de lettres
1921 : Obtention d'un diplôme d'études supérieures en histoire des religions
Août 1923 (à l'âge de 22 ans) : Obtention de l'agrégation de grammaire

Obligations militaires
3 septembre 1939 : Mobilisation dans le cadre de la déclaration de guerre à l'Allemagne
27 juin 1940 : Gaston WARINGHIEN est fait prisonnier de guerre.
9 septembre 1942 : Condamnation pour écoute clandestine de la radio anglaise et transfert au camp de LÜBECK (au nord de l'ALLEMAGNE)
2 mai 1945 : Libération par les britanniques du camp de LÜBECK
24 mai 1945 : Démobilisation à TOURS

Vie familiale
30 août 1922 : Mariage avec Andrée DELEBARRE
8 juillet 1923 : Naissance d'un premier enfant, Francis (qui meurt le 11/09/1923)
25 mai 1927 : Naissance d'un deuxième fils, Marc-Olivier (qui mourra à l'âge de 10 ans le 13/09/1937)
9 janvier 1931 : Naissance d'une fille, Annette
1977 : Décès de son épouse

Vie sociale
Au cours de l'année 1931 : Adhésion au parti socialiste SFIO (Section Française de l'Internationale Ouvrière)
1933 : Inscription à la franc-maçonnerie (Grande Loge « Le droit humain » dont il devient orateur)
1935 : Élection comme conseiller municipal de LILLE sur la liste de Roger SALENGRO (futur ministre de l'intérieur du Front Populaire)

Carrière professionnelle
Septembre 1926 (à l'âge de 25 ans) : Prise de fonction en qualité de professeur de lettres classiques (français, latin et grec) au lycée FAIDHERBE de LILLE.
1939 : Nomination en qualité de professeur de lycée à TOURS
1945 : Nomination comme professeur au Lycée DESCARTES de TOURS
1947 : Nomination comme professeur de littérature française à l'institut de TOURAINE
1949 : Installation à CHOISY-LE-ROI et affectation comme professeur au Lycée LAKANAL à SCEAUX.
1951 : Participation à l'élaboration de l'ouvrage « Français Élémentaire » dans la commission ministérielle GOUGENHEIM-BENVENISTE.
1959 : Collaboration au Grand Larousse Encyclopédique en dix volumes
1962 : Admission à la retraite comme professeur honoraire

1



Nia grupo plezure revidis Zef kaj Anne Marie kiuj jam plurfoje vizitis nin





*Armel Amiot*

Post bongusta, komuna tagmanĝo ĉiuj ĝuis pri la koncerto de Armel Amiot, bonega artisto kiu dancigas kaj kantigas nin.

Finfine post babilado kaj komuna foto finiĝis nia Zamenhofa Tago, en agrabla etoso.



**Nobel-premio pri paco pledas por mondo sen nukleaj armiloj**

Teksto tradukita de HORI Jasuo,

**Oslo.** Akceptante la Nobel-premion pri paco la japana grupo de postvivantoj de atombombo, «Nihon Hidankyo» fondita la 10-an de Aŭgusto 1956, instigis ŝtatojn agi por foriri nukleajn armilojn. Tiu minaco fariĝis denove nuna preskaŭ 80 jarojn post la bombadoj de Hiroŝimo kaj Nagazako.


Terumi Tanaka estis 13 jaraĝa kiam Nagazako estis pulverigita per la bombo kies hipocentro estis tri kilometrojn for de lia hejmo. Kvin familianoj estis mortigitaj

Ĉe la 2-a etaĝo li estis leganta libron kiam la A-bombo estis faligita.

*«Mi aŭdis la eksplodon, subite mi vidis blankan radiantan lumon ĉirkaŭantan ĉion kaj ĉio silentiĝis. Mi estis ŝtonigita. Mi sentis min en grandega danĝero»*

*Sinjoro Tanaka Terumi*






**Saluto de s-ro Tanaka Terumi, reprezentanto de Japana Hidankjoo, Japana Asocio de Atombombaj kaj Hidrogenbombaj Viktimoj, en la ceremonio de la Nobel-Premio pri paco.**

*Eltiraĵoj*

« Estas la kora deziro de la viktimoj de atombomboj, ke ni neniam havu eĉ unu atomarmilon », diris s-ro Tanaka Terumi (92-jara), reprezentanto de la Asocio, la 10an de decembro en Oslo.

…......

En aŭgusto 1956 ni formis Japana Hidankjoo. La postvivantoj de la atombombadoj kampanjas por du bazaj postuloj por certigi, ke la malhoma sufero, senprecedenca en la historio, neniam ripetiĝu.

…......

Hodiaŭ, ekzistas ankoraŭ 12 000 nukleaj kapoj sur la planedo, kaj 4 000 el ili estas deplojitaj pretaj por tuja lanĉo. Nun estas nuklea minaco de nuklea superpotenco Rusio en la ukraina milito, kaj krome, ĉar Israelo daŭrigas siajn persistajn atakojn kontraŭ la palestina aŭtonoma regiono Gazao, kelkaj ministroj parolas pri uzo de nukleaj armiloj. Dum aperadas viktimoj inter civiluloj, estas senfina frustriĝo, ke la « nuklea tabuo » estos rompita. Pri tiuj aferoj mi havas grandan bedaŭron kaj koleregon.

Mi estas unu el la postvivantoj de la atombombo de Nagasako. Kiam mi estis 13-jara, mi estis elmetita al la atombombo ĉe mia domo, situinta proksimume 3 kilometrojn oriente de la hipocentro.

…......

La maniero, kiel mi vidis la homojn mortantajn en tiu tempo, estis tiu, kiu apenaŭ povus esti nomata homa morto. Estis dekoj kaj centoj da homoj suferantaj sen ricevi ajnan zorgon de iu ajn.

Mi forte sentis, ke eĉ en milito oni ne devas esti mortigitaj aŭ vunditaj tiel. La atombombo de Nagasako eksplodis 600 metrojn en la aeron. 50% de la energio liberigita estis ŝokondo, kiu disbatis la domojn, kaj 35% estis varmoradio, kiu forte bruligis homojn ekstere kaj multajn disfalintajn domojn. Multaj homoj estis fermitaj en rompitaj domoj kaj forbruligitaj al morto. La ceteraj 15% estis radiado kiel ekzemple neŭtronoj kaj gamaradioj, kiuj penetris la homan korpon kaj detruis ĝin de interne, kaŭzante morton kaj atombombajn malsanojn. Antaŭ la fino de tiu jaro, la nombro da mortoj en Hiroŝimo kaj Nagasako estis taksita esti proksimume 140,000 en Hiroŝimo kaj 70,000 en Nagasako. Estas laŭtakse, ke pli ol 400,000 homoj postvivis la atombombadon, estante vunditaj kaj eksponitaj al radiado. La pluvivantoj de A-bomboj estis devigitaj silenti fare de la okupaciaj fortoj dum sep jaroj post la atombombadoj, kaj eĉ estis ignoritaj fare de la japana registaro, eltenante solecon, malsanon, aflikton, antaŭjuĝon kaj diskriminacion dum la venontaj 10 jaroj.

…......

Estas granda ĝojo, ke la Traktato pri la Malpermeso de Nukleaj Armiloj estis promulgita la 7-an de julio 2017 kun la subteno de 122 landoj.

…......

Estas 4000 nukleaj kapoj, kiuj povas esti lanĉitaj tuj. Ĉi tio signifas, ke tuj povus aperi damaĝoj centfoje aŭ eĉ milfoje pli grandaj ol tio, kio okazis en Hiroŝimo kaj Nagasako. Vi povus fariĝi viktimoj iam ajn aŭ vi povus fariĝi atencintoj. Tial mi ŝatus, ke ĉiuj tra la mondo diskutu kaj serĉu kune, kion ni povas fari por forigi nukleajn armilojn.

…......

Ne lasu la homaron sindetrui per nukleaj armiloj!!

Ni kunlaboru por krei homan socion en mondo sen nukleaj armiloj kaj militoj!!

**********

## La legendo de la mil gruoj kaj historio de Sadako Sasaki



*Statuo omaĝe al Sadako Sasaki*

Japana legendo rakontas, ke, se vi sukcesas faldi 1000 origami-gruojn, via deziro realiĝos.

Sadako Sasaki, 2-jara knabineto, loĝis en Hiroŝimo, 2 kilometrojn for de la loko de la bombo-eksplodo. Ŝi ne estis vundita sed en 1954 leŭkemio estis diagnozita, la «A-bomba malsano».

Sadako sukcesis faldi 644 gruojn antaŭ ol morti en oktobro 1955, ŝi estis 12-jara.

Memore al ŝi, statuo de knabineto tenanta oran gruon en la brakoj estis starigita en la Parko de la Paco de Hiroŝimo. Ĉe ĝia bazo oni povas legi:

*«Jen nia krio*
*Jen nia preĝo*
*Por konstrui pacon tra la mondo»*

Kaj ĉiujare miloj da girlandoj de gruoj falditaj de infanoj estas pendigitaj sur ĝi.

**UNIVERSALA DEKLARACIO**
**DE LA HOMAJ RAJTOJ**

Adoptita kaj proklamita de Rezolucio 217 A (III) de la Ĝenerala Asembleo, 10an de decembro 1948

## Artikolo 26

1. Ĉiu havas rajton je edukiĝo. La edukado estu senpaga, almenaŭ en la elementa kaj fundamenta stadioj. La elementa edukado estu deviga. La teknika kaj porprofesia edukado estu ĝenerale akirebla, kaj pli alta edukado estu egale akirebla por ĉiuj laŭ ties meritoj.

2. Edukado celu la plenan disvolvon de la homa personeco kaj plifortigon de la respekto al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Ĝi kreskigu komprenon, toleron kaj amikecon inter ĉiuj nacioj, rasaj aŭ religiaj grupoj, kaj antaŭenigu la agadon de Unuiĝintaj Nacioj por konservo de paco.

3. Gepatroj havas unuavican rajton elekti la specon de la edukado, kiun ricevu iliaj infanoj.

## Artikolo 27

1. Ĉiu rajtas libere partopreni la kulturan vivon de la komunumo, ĝui la artojn kaj partopreni sciencan progreson kaj ĝiajn fruktojn.

2. Ĉiu havas rajton je protekto de la moralaj kaj materialaj interesoj rezultantaj el eventualaj sciencaj, literaturaj aŭ artaj produktaĵoj, kiujn li aŭtoris.




*La teksto de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj disponeblas ĉe la [retejo de Unuiĝintaj Nacioj](retejo de Unuiĝintaj Nacioj).*